

Carl Riedel,  
Aŭdu, paŝtistoj

*tradukita de Albrecht Kro-  
nenberger*

Aŭdu, paŝtisto,  
mi diras al vi  
Bonan sciigon  
pri l' Filo de Di':  
Enkarniĝinta,  
ĵus naskiĝinta,  
Ĉirkaŭvindita,  
entrogigita.  
Gloron al Li!

Vidu, homidoj,  
la amon de Di'.  
Malsupreniris  
la Vorto por vi.  
Kruce murdota,  
entombigota,  
Resurektonta,  
ĉiel-ironta.  
Gloron al Li!

Venu, kristanoj,  
rapidu al Li,  
Kiu bebiĝis  
en stalo por vi.  
Miru ĝojante,  
kore kantante,  
Genufleksante,  
Lin adorante.  
Gloron al Li!

...

Carl Riedel,  
Nesem vám noviny

*tradukita de N. N. 44*

Nesem vám noviny,  
poslouchajte,  
z betlémské krajiny,  
pozor dejte.  
slyšte je pilně  
a neomylně,  
rozjímajte.

Syna porodila  
čistá Panna,  
v jesličky vložila  
Krista Pána.  
Jej obvinula  
a zavinula,  
plenčičkama.

K němuž to andělé  
z nebe přišli,  
i také pastýři  
jsou se sešli.  
Jeho vítali,  
jeho chválili,  
dary nesli.

Andělé v oblacích  
prozpěvují,  
narození Páně  
ohlašují,  
že jest narozen,  
v jeslích položen,  
oznamují.

...

Carl Riedel,  
Venu, paŝtistoj

*tradukita de Manfredo Ratis-  
lavo*

Venu, paŝtistoj,  
Vi homoj al ni!  
Venu kaj vidu  
La filon de Di'!  
Kristo hodiaŭ  
Por vi naskiĝis,  
Via Savanto  
Li elektiĝis.  
|: Ne timu vi! :|

Venu rigardi  
Vi tion kun ni,  
Kion promesis  
Ĉiel-melodi'!  
Kion vi trovos.  
Ni diskonigu,  
Kaj la Sinjoron  
Ni honorigu!  
|: Haleluja! :|

Estas ĝojego  
Por la paŝtistar',  
La sciigaĵo  
De la anĝelar':  
Inter la homoj  
Nun iĝu paco  
Kaj sur la tero  
La Dia graco.  
|: Al Di' honor! :|

...

*Traduko de la Germana poemo "Kommet, ihr Hirten" de CARL RIEDEL (\*1827-10.05 - †1888-06-03) en Esperanton de ALBRECHT KRONENBERGER (\*1940-01-21) en 1990.*

*Arg-565-1142 (2010-09-20 11:11:28)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en la retejo <http://reocities.com/cigneto/thctxt/a/auxdupasx1.html>.*

*Traduko de la Germana poemo "Kommet, ihr Hirten" de CARL RIEDEL (\*1827-10.05 - †1888-06-03) en ĉeĥa de N. N. 44.*

*Arg-565-1460 (2012-12-26 12:32:12)*

*Vidu ankaŭ: <http://archiv.radio.cz/christmas/koleda/k1.html>.*

*Traduko de la Germana poemo "Kommet, ihr Hirten" de CARL RIEDEL (\*1827-10.05 - †1888-06-03) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1982.*

*MR-014-3 / Arg-565-1140 (2010-09-20 10:01:32)*

*La muziknotojn vidu jen: [http://www.lieder-archiv.de/lieder/show\\_song.php?ix=200038](http://www.lieder-archiv.de/lieder/show_song.php?ix=200038).*